


SUPERANCIA STELO



Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"
Jarabono: 25 F al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon
CCP 956-28 P Montpellier N°117 - 2a kvaronjaro 91

Le Provençal dimanche

JOURNAL DES PATRIOTES SOCIALISTES ET REPUBLICAINS

1F90

ARLES

Le congrès de l'Espéranto

La suno brilas supre la urbo: le soleil brille sur la ville. Pourquoi trois mille langues (actuelles) pour narrer cette vision quotidienne? En 1887, un jeune ophtalmologue de Varsovie, Lazare Louis Zamenhof, publiait la première brochure de "langue internationale" sous le pseudonyme de Dr Esperanto ("celui qui espère").

Depuis, le nombre d'espérantophones (plus élégant à dire qu'espérentistes) n'a cessé de croître. Aujourd'hui, dans la région PACA, on recense 2.000 adhérents à la Fédération Provençale d'Espéranto. Les Bouches-du-Rhône sont un département pauvre dans ce domaine. Les espérantophones sont vieillissants.

l'Espéranto se perpétue par une littérature abondante (deux mille manuels, cent soixante lexiques), par l'université (trente postes universitaires en France dont un à Aix-en-Provence), par des émissions de radio... et par l'action d'hommes comme le cyclo-espérantiste Jorgos qui a effectué le tour du monde à vélo pour propager les bonnes paroles du Dr. Zamenhof. Jorgos est d'ailleurs présent à ce congrès. Deux jeunes Ariégeois l'ont accompagné. Ils représentent, avec trois jeunes filles de la Lozère, la nouvelle génération d'espérantophones.



Les espérantistes des régions PACA et Languedoc-Roussillon tiennent leur congrès à la M.J.C. (photos M.P.)

Deux congrès en un

Pourtant, la fédération reste très active et durant deux jours, les adhérents PACA et Languedoc-Roussillon se retrouvent à la M.J.C. d'Arles pour y tenir leur congrès annuel régional respectif et, pour la première fois, un congrès commun. Jean Gauthier, directeur de la M.J.C., est le président de cette interfédération.

Un congrès est également l'occasion de découvrir ou re-découvrir que

Nouvelle plaque

Au programme donc de ces deux journées de congrès à Arles: outre la visite de la ville et les assemblées générales, des spectacles (marionnettes yougoslaves et chanteurs barcelonnais), une exposition sur l'histoire du pain et des débats sur l'Espéranto et l'Europe ou sur le pain et la meunerie romaine à Arles.

Ce matin, les congressistes participeront à une réception en mairie. Ils se rendront ensuite à l'inauguration de la nouvelle plaque indiquant le chemin

Zamenhof situé près des Alyscamps. Celle-ci mentionnera désormais que ce cher docteur n'était ni un astronaute russe, ni celui qui a développé des réflexes conditionnés chez son chien, mais l'auteur de l'Espéranto qui naquit en 1859 et mourut en 1917.



Le chemin du Docteur Zamenhof et sa nouvelle plaque indicatrice.

De l'avis de tous les participants, ce congrès interfédéral fut une réussite. Plus de cent participants dont certains de Hongrie, Yougoslavie, Espagne, Allemagne, Angleterre, un programme varié avec des marionnettes, des ordinateurs... et des humains s'exprimant en E°, sans parler des réceptions officielles, de découvertes enrichissantes. Un grand merci au maître des lieux, Jean Gauthier, pour son appui logistique efficace. A l'an prochain à Montpellier et à 93 ou 94 pour un nouveau congrès interfédéral, cette fois en Languedoc. A tous, bonnes vacances d'été et bonne lecture du n° 117 de SFS!



BILDOJ pri nia Federacia kongreso en Arles

Ni dankas J.Gauthier, ne nur pro la bonega organizado de la kongreso sed ankaŭ pro la fotomuntado kaj la realigado de la du paĝoj, kiujn li donacis al la legantoj de SFS.

Ĉi-supre, oni rekonas de maldekstre: Michel k. David (Ariège), A. Loisel k. J. Hénin (fed. de Provenco kaj L-R), Sro Pilliol, honora urbestro, Sro Piques, vicurbestro, F-ino O. Rio, "reĝino del' Felibrige", R. Llech-Walter, Y. Vierne (sidanta)

Sur la alia paĝo: -la kongresejo 1, 2

- 3 - Vanessa (10jara) anstataŭas sian fratinton Nadège kaj salutas la kongresanojn.
- 4 - Carine, Noëlle kaj Christelle (La Canourgue) ludas teatraĵeton de R. Schwartz
- 5 - Pupteatra spektaklo (S-ino Imbert, el Jugoslavio)
- 6 - "Sinjoro Badin" (Courteline) ludata de J-P. Peray kaj F. Terral (mankas sur la foto S. Authier)
- 7 - La grupo "Kaj tiel Plu" el Barcelono muzikas kaj kantas.
- 8 - Akcepto en la junulgastejo, Jean Gauthier (dekstre) prezentas Odyle Rio kaj rimarkigas, ke ŝia ĉeesto kongruas kun niaj deziroj : regiona lingvo, nacia lingvo kaj helplingvo por ĉiuj.

Se vi-mem faris fotojn de nia kongreso en Arles, sendu ilin al J. Gauthier (MJC de Arles). Ili eble aperos en nia venonta bulteno.

Raporto pri la komuna kongreso de la Federacioj de Provenco kaj de Langvedoko-Rusiljono jam aperis en "Franca Esperantisto", redaktita de Marie Hunninck, Vicprezidentino de la Provenca Federacio. Jen ĝi. Ankaŭ legu alian raporton p. 4.

Provenca kaj langvedoka federacioj

Kongreso de Provenca kaj Langvedoka federacio okazis en Arlezo, la 13an kaj 14an de aprilo en la kulturdomo. Zorgis surloke pri la organizo Jean Gauthier. La kongreso malfermiĝis je la 9a. Pli ol 100 partoprenantoj el la du federacioj kaj aliaj departementoj ĉeestis, sed ankaŭ esperantistoj alilandaj, sen forgesi la Federacion de Vaŭkluzo kies libroservo tenata de sinjoro Gente estas tre riĉvola.

Dum grupo vizitis la antikvan urbon, kelkaj kongresanoj trapasis la unua- kaj duagradajn ekzamenojn. Pro ne ĉeesto de pedagogiuloj, la trapasado de kapableco ne eblis.

Ĉiu federacio kunvenis aparte kaj debatis pri la financaj raportoj, pri elekto de novaj komitatanoj kaj pri la bulteno.

Ege necesas por la informo kaj la movado ke la diversaj eventoj de Esperantujo estu konataj. Ĉiu membro, grupo devas informi pri sia interna vivo, atentigante la horojn kaj tagojn de kursoj, la eventojn: kunvenojn, festotagojn, partoprenon en foiro, staĝojn, kongresojn... Pli bone estus rekte sendi la informojn al la bulteno de via federacio, per tiu sinteno, la informoj estos atingeblaj de ĉiu esperantisto.

Ilona Koutny el Hungario, survoje al Gresillon, interesis multajn per sia prezento de „lernado per komputilo“. Ŝi profesie instruas pri Esperanto pere de ILEI.

Post la cerbumado, okazis la distra vespero. Pupet-teatro el Zagreb, gaje komencis. Notindaj estas la pupetoj, kiuj estas faritaj nur per kukurboj, la scenetoj formiĝas laŭ la formoj, kiujn ili sugestas.

Tri junulinoj el la grupo de Beziers ludis sceneton verkitan de Raymond Schwartz, sekvis teatraĵeto de Kurtelino, surscenigita de Jean-Pierre Peyret. La vespero finiĝis per kanzonoj, el Katalunio belege muzikigitaj kaj esperantigitaj de la muzikistoj mem: la grupon *Kaj tiel plu* vi povas atingi rekte skribante en Hispanion: Xavier Rodon, c/ Barcelono 3, 08301 Matoro, Hispanio.

Konvena sumo estas petata por plibeligi viajn esperantajn eventojn.

Dimanĉon, la ĉeestantaro rigardis filmon *Eŭropo*, sekvis debato, gvidata de Patrick Lagrange kies temo estis Eŭropo de la civitanoj, kiu sekvas la Eŭropon de imperiestroj kaj komercistoj.

Sinjoro Jacques Piques, vicurbestro, akceptis la esperantistaron en la salono de la urbodomo, ornamita per folkloraj bildoj de la Arleza regiono. Ĉiuj altvalore taksis lian donacon de 2 antikvaj sigeloj de la urbo de Arlezo al la prezidantoj de ambaŭ federacioj.

Post inaŭguro de pli klarigita plako „Vojo Zamenhof“ la grupo kuniĝis en la junul-gastejo, Arlezanino, tipe vestita, omagis al Esperanto, en la provenca lingvo, kaj salutis sinjoron Lech Walter, poeto de la „felibre“.

Antaŭ ol fermi tiun prave sukcesan kongreson, sinjorino Humm el Avinjono prelegis kaj prezentis lumbildojn pri „Barbegal, romia muelejo“. Samtempe, en la koridoro de la kulturdomo, estis prezentita ekspozicio de tradiciaj kaj tutformaj panoj en rilato kun la parolado.

La esperantistaro disigis fine de la posttagmezo.
Hunninck Marie



La M.J.C. d'ARLES
est prête pour accueillir
150 congressistes.



1 2



Le CONGRÈS
d'ARLES
=
13-14
AVRIL 1991



Tiun-ĉi jaron nia Federacia Kongreso okazis en Arles (13) kun la Provenca Federacio. Entute centkvin partoprenantoj ĉeestis (kvardeko el Langvedoko-Rusiljono). Ankaŭ partoprenis la Nacia Prezidantino de U.F.E., Renée Triolle. Sabate posttagmeze ĉiu federacio kunvenis aparte. En nia federacio senkulpiĝis S-ino Lucette Négron (kasistino) kaj S-ro Cesareo Borque pro malsano. Malfermo, bonveno, tagordo... Ĉiu gruprespondeculo prezentis sian agadon: Béziers, La Canourgue, Montpellier, Nîmes, Perpignan, St Mamert. Neniu reprezentis la departementon Aude, sed Jorgos iomete parolis pri tio; ankaŭ alia esperantisto S-ro Luttermann, kiu loĝas apud Durban, havas kontaktojn en tiu departemento. Multe da aktivaĵoj en nia regiono: staĝoj (Montpellier, Béziers), koncerto (Kajto), Ekspozicioj (Foiroj de la Asocioj), Radio-elsendo (kataluna lingvo kaj aliaj)... Diskuto pri la parola parto de "Atesto pri Kapableco", nuligo de la Nacia Kongreso en Nîmes en 93, ktp. Financa raporto (ĝi aperos en SFS), federacia bulteno (enhavo pli kaj pli interesa dank'al J. Hénin). Dankon al S-ro Capus (Montpellier) pro la presado kaj sendado. Renovigo de la komitatanoj: En 91 finis sian mandaton Cesareo Borque, Claude Cayzac, Charles Gérard-Voinçon, Jean Hénin, René Llech-Walter, Yvette Vierne. Ĉiuj rekandidatiĝis krom S-ro Borque pro malsano. Ĉiuj estis reelektitaj. F-ino Annick Tora (Peyriac de Mer) estis unuanim-eme elektita. Bonvenon! Post la vespermanĝo ĉiuj sin retrovis en la granda salono de la MJC de Arles por distra vespero

- Pupteatra spektaklo de Jugoslavino
- Teatraĵo de Courteline far la grupo de Béziers
- Kantado de Katalunaj amikoj el Barcelono
- Skeĉo (junulinoj el La Canourgue)

Vere granda sukceso de tiu vespero. Dimanĉe matene, diskuto pri mocio koncerne la parolan parton de "Atesto pri Kapableco", videokasedo pri Eŭropo, inaŭguro de nova ŝildo, akceptoj en la urbdomo kaj la junulgastejo. Tagmanĝo kaj prelego kun lumbildoj. Bona etoso dum tiu interfederacia kongreso, bone organizita de S-ro Gauthier kaj S-ro Blary. La venonta federacia kunveno okazos en Sète (Lazaret) la 15an de Septembro.

Charles GERARD-VOINCON

*
*

Mocio pri trapaso de parola parto de Atesto pri Kapableco
proponita kaj akceptita en Arles la 14an de aprilo 1991.

La Langvedoka-Rusiljona kaj la Provenca federacio dum kongreso en Arles la 14an de Aprilo 91, -konstatante la gravecon por la movado de la problemo de ekzamenoj, -dezirante, ke la nivelo de tiuj ekzamenoj restu alta -vidante la malfacilaĵojn renkontitajn de la kandidatoj, sukcese trapasintaj la skriban parton de "Atesto pri kapableco", sin prezenti al la parola parto, -konstatante la kvazaŭan neeblecon starigi juĝantaron konsistantan el tri "pedagogiuloj",

PROPONAS al la "Franca Esperanta Instituto" la modifon de la regularo:

"La juĝantaro de la parola parto konsistu el unu pedagogiulo asesore helpata de du kapableculoj; la fina decido apartenos al la pedagogiulo."

RIMARKIGAS, ke konsento kun tiu propono permesus organizi pli oftajn sesiojn de la parola parto de "Atesto pri kapableco", okaze ekzemple de regionaj kongresoj. Tiamaniere, la rezulto estos la plimultigo de kandidatoj, kiujn nun malkuraĝigas la maloftaj sesioj kaj la malprok-simeco de la proponitaj centroj kaj la rezultantaj elspezoj.

Tiu mocio estis sendita al la Prezidanto de FEI, kiu neniam respondis. Espereble malcentra-lizado ne restos...koncepto...de la provincanoj

Antaŭ la fino de la kongreso okazis debato, gvidita de Jorgos, pri informado. Tro malmultaj personoj uzas la minitelan servon 36-15 Esperanto. Alia afero estas rapide informi la esperantistaron, kaze de grava evento; la nuna sistemo estas malrapida kaj malefika. Pro tio la sugesto starigi reton tra nia(j) regiono(j). Se iu ekscias pri io grava, li/si informu respondeculon de la federacio aŭ aktivulon de la departemento, kiu tuj alvokos mallonge tri aliajn personojn; ĉiu el tiuj tri personoj alvokos tri personojn, ktp. Komprenibile la listo de la alvokendaj personoj devas esti preta kun la telefonnumeroj. Tiel post kelkaj minutoj tuta reto estos informita. Ekzemple reagi dum elsendo, ktp.

Dimanĉon matene la kongresanoj spektis tre interesan videokasedon en E° pri Eŭropo. La titolo estas "Post 20 Jarcentoj". Akiris ĝin S-ino Gaussen kaj J. Hénin.

Vi povas ankaŭ mendi ĝin ĉe: Commission des Communautés Européennes
Rue de la Loi 200 - B- 1049 Bruxelles

La kosto estas 30 Ekuoj; atentu, ke via televidilo legu la Pal-sistemon. Tiu kasedo ankaŭ taŭgas por forumo de la ĉocioj; ĝi certe pli allogas ol panejoj pri Esperanto...

Malagrabla surprizo: En la fina parto de nia komuna kongreso, defore veninta samideanino havis malagrablan surprizon: post aĉeto de libroj (Tinĉjo, bildstrio pri Zamenhof, "la bona lingvo", ktp) kaj meto de ili sub siarŝeĝo dum la lasta debato, ŝi forgeslasis ilin momente por urĝeta afero... kaj reenirante la salonon, ŝi retrovis nur kelkajn de la aĉetaĵoj (ne plu subŝeĝe sed apud lumbildaparato), tiel markis 2 bildstrioj. Ĉu stelitaj? Espereble ne... eble nur pruntitaj... Kulp(et)ul(in)o bonvolu resendi tiujn librojn al SFS, kiu resendos al koncernatino. Antaŭdanke.

FINANCA RAPORTO (1990)

Je la 31-12-89 la Federacio posedis

30087,47 F

Enspezoj en 1990

SFS	3020
UFE-kotizoj	1001
Kongreso	3750
Libroservo	1167,50
Anonima donaco	2300
Ŝparkaso/profito	257,69
	<hr/>
	41583,66 F

Elspezoj:

SFS	3001,93 F
Helpe Jorgos	200
Leterpapero	1577,38
Kovertoj	474,40
Kongreso:tagmanĝo	2537
Diversaj elspezoj(Alès)	562
Vojaĝo de P.Janton	500
Sekretariejo	558,40
Aliĝo Mondhejmo	300
Helpe Mondhejmo	3000
Pĉk	5
Libroservo (antaŭpago)	1605
Helpe al gejunuloj	2250
Helpe Cayzac	1487,20
	<hr/>
	18058,31 F


Restas en la Kaso	41583,66 F
	-18058,31 F
	<hr/>
	23525,35 F

Ŝparkaso	21241,65 F
Poŝtĉeko n° 569	+2283,70 F
	<hr/>
	23525,35 F

La kasistino : L. Négron

"Provence E°" kompreneble ankaŭ detale raportas pri la kongreso de Arles sed plej allogas la frontpaĝo kun la 12 standardoj de la landoj de la Eŭropa komunumo...12 koloraj standardoj! Ni iom ĵaluzas! La Provencanoj kunvenos kaj piknikos en Blieux la 21an de Septembro. En tiu vilaĝo (okcidente de Castellane, apud la kanjono de la rivero Verdon) loĝas Patrick Lagrange, vicprezidanto de la federacio.

Pli frue ni regule ricevis novaĵojn pri la grupo de Heidelberg (D). Heidelberg estas ĝemelurbo de Montpellier. Post longa silento, reaperas bulteno ne nur pri la tiea grupo sed pri la tuta regiono Baden-Württemberg. Ĝi anoncas ĉiujn E°-kursojn en la regiono kun ĉiuj necesaj referencoj, ankaŭ la diversajn aranĝojn en la venontaj monatoj. Ekzemple la "Baden-Virtemberg E° Ligo" (Bavelo) kunvenos kun la Germana Ea Fervoĵista Asocio en Friedrichshafen apud la svisa kaj aŭstra limoj de la IIa ĝis la I3a de Oktobro. Ebleco tranokti (unuavice junuloj) en trajnovagono. La bulteno estas dulingva, abono kostas 20DM.



La meilleure manière d'honorer le mérite d'un homme de bien, c'est de continuer son oeuvre.

Cu ili bone staĝumis en Béziers?

Ŝajnas, ke jes. Mi, Herlok Solmes, privata detektivo, kaŝe sekvadis la tutan aferon, pro speciala peto de U.F.E. (Unuiĝo de Francaj E-spioj) kaj mi povis aserti, ke krom iom malvarmeta etoso ĉe l'alveno, pro mankanta hejtado, ĉio iris tute glate poste ĝis la fino de la staĝo. Tio, dank'al sindonema agado de la Béziers-a triopo: Suzanne Authier, Fernande Terral kaj Jean-Pierre Perray. Ili ja perdis kelkajn harojn kiam, tute neatendite oni ŝanĝis la ejon je l'tago mem de la kunveno, sed la fidela Maurice Authier filozofe (kaj iom froste!) gardo-staris ĉe l'Kastelo Devèze, kaj neniu partoprenanto perdiĝis en la naturo!

Ni eĉ multe gajnis en la ŝanĝo, ĉar la Centro Mercier kutime estas uzata de prosperaj P.D.G-oj kaj estas tute lukse provizita : agrablaj ĉambroj, manĝoj tri-stelaj kaj afabla, ĉarma servistino. Kion pli peti por bone travivi staĝon?

Do, ĉiu sin sentis preta alfronti la kursgvidantojn de la tri gradoj: elementa, progresiga kaj eĉ supera ! La vesperaj horoj permesis al ĉiuj malstreĉi la meningojn, dank'al viglaj muzikistoj logitaj de l'amikino Fernande Terral, kiu mem ludas, dank'ankaŭ al teatraj talentoj de la jam nomita triopo, ne forgesante la seancon de l'amiko Jean Hénin, kiu vojaĝigis nin tra Korsiko kaj Sardinio pere de tre belaj ĵumbildoj.

Ekzamenoj sankciis la kursojn. Laŭ koridoraj onidiroj, ĉiuj mirege trapasis tiun tiklan operacion. Ni vidis.

Jen kvar tagoj plenplene kaj bonege uzitaj, vera baniĝo en E-on, kion ni ĉiuj foje bezonas. Tiuj, kiuj ne venis, ion bonan maltrafis!

Nu do, ili havos neniun motivon ne veni proksiman jaron

BOTSO.

Dankon al nia P.S. (privata spiono) pro la raporto. Li-mem instruis dum la staĝo kaj same kiel la "triopo" meritas niajn gratulojn.

Erari unufoje povas okazi, erari dufoje estus nepardonebla. Se la staĝo okazos en 92 (fine de Majo), ne forgesu partopreni !

Pikniko en Caùduro

Ĝi okazis la 23an de Junio kun dekkvino da esperantistoj kaj belega vetero. Mankis nek la ruĝa vino de St Chinian nek bongustaj ĉerizoj. La salono estas nun kovrita kaj tiel ni povis pikniki en la ombro. Pliriĉigis nian kunvenon la ĉeesto de Pola samideano el la regiono de Łódz. Ni ĉiuj konstatis la bonan progreson de la konstruado de "Mondhejmo". La senlaca laborado de S-ro Sanz ebligas vidi "la finon de la tunelo". Espereble tegmento protektos la tuton dum la venonta vintro. Tio ankaŭ dependas de la financa helpo de esperantistoj. Fariĝu membro de "Mondhejmo"!

Venontaj kunvenoj - Sabaton, la 21an de Septembro je 14h30

" la 26an de Oktobro "

" la 30an de Novembro "

Vi povas rimarki, ke la kunvenoj ne okazos, kiel kutime, komence de la monato. Tio necesas pro pri regula aranĝo de niaj renkontiĝoj.

Alia (eventuala) ŝanĝo : la urbeŝtaro starigas novan "Domon de Asocioj" en malnova monaĥinejo. Ĉu la riparoj estos finitaj en Septembro? Povas esti...

Se jes, ni havos alian kunvenejon en tiu konstruaĵo, sed nia klubejo estos komuna kun alia(j) asocio(j). Do, legu "Midi Libre"; ni informos vin pri tiu temo.

La Zamenhofa tago okazos la dimanĉon 15an de Decembro. Aliaj informoj aperos en SFS de Oktobro; ĉiuj, eĉ ne Béziers-anoj, estas kore invititaj.

Agrablajn feriojn; Ĝis Septembro!

FESTIVALO

INTERNACIA FESTIVALO de ESPERANTO

en PARIZO

de la 9a ĝis la 11a de Novembro

(Gvidata vizito de Parizo)

Jam por la 7a fojo

kun inter aliaj :

- "Kia koincido!" el Germanio : "La pupodomo" de Ibsen
- Recitalo de Ĵak Lepuil (Francio)
- Muziko per malnovaj tradiciaj instrumentoj
- Koncerto de Rokmuziko
- Forumo : "Kien la poezio?", ktp, ktp

Ekspozicio de esperantistaj Artistoj

MONTPELLIER

Vizito de la grupo "Kajto":

200 afiŝoj gluitaj; 50 ĉeestintoj inter kiuj 24 esperantistoj kaj 6 nederlandlingvaj Montpellieranoj. Bonega etoso dank'al granda kvalito de la 4 kantistoj-ludistoj-dancistoj. 2hora programo de esperantigitaj kanzonoj (tamen kelkaj en la friza lingvo) kaj instruado de dancoj. Tre ŝatata kaj interesa vesperado.

Lasta kunveno la 5an de Junio : ĉeestis 15 homoj.

Claude Cayzac montris artikolon, kiu aperis en "Kataluna Esperantisto" kaj "Franca Esperantisto": "Ĉu Zamenhof havis la polan naciecon?". La enhavo malagrabla mirigis CC. Diskuto inter la ĉeestantoj, ĉiuj opinioj estis reprezentataj.

Yvette Vierre parolis pri apartaj kovertoj, kies dorsaj flankoj mallonge prezentas nian lingvon. La grupo mendos 500 ekzemplerojn. YV ricevis leteron el grupo da 40 Hungaroj, kiuj petas malmultekostan kampadejon por restadi unu nokton; ĉu stadiono taŭgas kaj eblus? Oni petos tion de urbestroj de kelkaj vilaĝoj en la ĉirkaŭaĵoj de Montpellier.

Anonco pri la venonta lerneja jaro : la ĝenerala kunveno okazos la 2an de Oktobro, je la 18a horo en la kutima kunvenejo, nome "Centre social, 410 Avenue de Barcelone - La Paillade 34080 Montpellier. La programo konsistas el agadraporto, financraporto, buĝeto, elekto de la komitatanoj kaj diversaj demandoj.

La nun tradicia festo en la ĝardenoj de Ges. Diez okazis la 19an de Junio. Amika etoso kaj ĉeesto de Pola amiko.

Reĝistigo: Lastfoje artikolo el "Ile de France E" pri "staĝoj ĉe Mediteraneo" menciis la "Internacian Semajnon" en Sète... de la 7a ĝis la 14a de Oktobro. Kompreneble la semajno okazos kiel kutime en Septembro kaj tiu de Habère-Poche en Aŭgusto. Al ambaŭ ni deziras bonan sukceson.

PERPIGNAN

Vizito de Bulgarino

Korespondantino de Sro Llech-Walter, F-ino Emilia Ivaneva, Doktorino pri Internacia Juro en Sofio, haltis en Perpignan (survoje al Genevo) por viziti la grupon de nia urbo.

Ŝi partoprenis akceptadon organizitan de Sro Léophonte Albert, socia konsilanto de Sro Alain Pohér, Prezidanto de la Senato, kun la ĉeesto de multaj reprezentantoj de Kulturaj Asocioj de Norda Katalunio

La grupo de Perpignan atendas la viziton de 40 Hungaroj dum la someraj ferioj. Tereno estas trovita por tranokti (certe temas pri la sama grupo kiel en Montpellier)

NIMES

Club Unesco espéranto

■ L'assemblée générale du club Unesco espéranto a connu le jeudi 8 mai un plein succès. Les jeunes des clubs de Nîmes, Uzès et Saint-Mamert s'en sont donné à cœur joie grâce au talent d'une jeune accordéoniste, Mlle Philippon, qui a donné un vrai récital de musique occitane.

Un Roumain, M. Dinku, représentait le Mouvement de la jeunesse espérantiste roumaine. Depuis la chute de Ceaucescu, l'espéranto est autorisé en Roumanie. M. Dinku faisait état de révélations sur la réalité des événements.

Le club Unesco espéranto entend encourager ces échanges internationaux directs grâce à l'usage d'une langue neutre, l'espéranto. Pour se renseigner, appeler le club Unesco, salle Le Méridien, au Castanet. Permanence chaque mercredi de 15h à 19h, tél. 66.81.14.94.

041310

Nia Klubo : Unesco-klubo : Esperanto Nîmes.

Speritis aparte interesan okazintaĵon : nome : la viziton de Sinjoro Dinku, juna Rumanino el Bukaresto, aktiva membro de Teĵo, meritplena ĉar li tute sola kaj kase lernis Esperanton.

Li rakontis al ni vere neordinaran aferon : kiel aktiva kontraŭulo de la reĝimo, li, iun tagon bruligis publike grandan portreton de Ceaucescu sur la ĉefa Nacia Placo de Bukaresto.

Tiam subite elaŭtigis iu granda barbulo, kiu fulme fotis la scenon. Kompreneble tio naskis gravan demandon en la cerbo de Dinku. Ĉu policisto? Ĉu.....?

"Kio grava povos okazi al mi?....."
.....Kelkajn semanojn poste venis triumfe al li najbaro, ven la mano, la franca revuo "Le Point". Imagu, la plenaĝa kovrilo montris ĝuste la travivitan scenon. Do, li konkludis, ke tiu barbulo estis nur fotisto, kiu kaptis unu el la plej valoraj por li fotojn.

Sed kiel la revuo atingis Dinku(n)? Jen : iu Rumanino loĝanta en Parizo sendis "Le Point" al sia frato en Bukaresto. Kaj vere mirakla hazardo, tiu frato estas konato de Dinku.

Jen kial fiere- kaj prave- Dinku povis prezenti "Le Point" al ĉiuj Francoj, kiam li prelegis en la grupoj.

Ĉu necesas diri, ke lia prelego estis el la plej interesaj, kiujn ĝuis nia grupo. Kompense ni povis regali lin per aparte nekutimaj aferoj por li : unue, li povis stiri konkurserkurant-automobilon - posedadon de Sro Petitpas - kaj aviadile (por li unuan fojon) flugi en la aero kaj havi belan vidon de la regiono.

Nun, ni atendas polan viron proksimume je la deksepa de Junio, poste dum la somero Ĉinon, paron da Poloj, du Hungarojn, geflaĝojn.

Fine de Julio, deknab-personoj iros Bergenon.
La klubo Unesco dankas la personojn, kiuj volonte kaj afable akceptas esperantajn eksterlandanojn, tiel la klubo vivas entuziasme kaj tiuj personoj bone ekzercigas en esperanta lingvo.

Por kompletigi la raporton pri "Unesko-E°-Nîmes", aldonendas, ke la ĝenerala kurveno okazis la 8an de Majo ĉe la aerodromo de Uzès. Se iuj dancis posttagmeze dank'al la akordiono de F-ino Philippon, aliaj ricevis aerobapton. Nome de Sro Dincu, dankojn al la grupo de Montpellier pro la vizito de la urbo kaj donaco. La Unesko-grupo dankas al tiuj, kiuj helpis por la kvintaga akceptado. Laŭ citaĵo de "LaÛte": "AÛdacu Esperanton, Esperanto aÛdacu!"
*** La Prezidantino de la klubo "Unesko".

AVERTO: La du artikoloj el "La krokodilo", kiuj sekvas, estas nekorektitaj. Respondecaj pri ili Paul Touron, por kiu skribi "Hispanio" anstataŭ "Espanio" estas cenzuro... La tajpanto de SFS ne intencas polemiki, la legantoj juĝos kaj la federacia komitato decidus en Septembro, ĉu la korekto de inventitaj vortoj estas normala afero aŭ cenzuro.


LA KROKODILO

de Nîmes

05/Majo 1991 *
Membro de Nord-Okcidenta Mediteranea Asocio en TUTMONDA AMIKARO : de Espanio ĝis Italio , kiuj samideanoj aŭ grupoj sendu al ni informojn pri iu kurveno aŭ vojaĝo, kiu povus interesi tiun regionon, kaj ni sciligos tuj ilin. Tio nur permesos Interŝanĝojn tra ESPERANTUJO.

CENTRE CULTUREL ESPERANTISTE de Nîmes kaj FEDERACIO ESPERANTO F30
[X] ESPERANTO 3, Rue de Combret F-30900 Nîmes ☎ 66/64/03/22

Mi insiste petas cenzuristojn ne korekti la vorton ESPANIO, kiun estas voleme elektita de la respondeculo de "LA KROKODILO de Nîmes". Mi ek proponas : Deklaro anstataŭ Germanio, Grand-Britio anstataŭ Britio, k.t.p. Antaŭdankojn ! Pri la forgesitaj akuzativaj indikoj aŭ aliaj eraroj estas tute alia ne hezitu , korektu !
En tiu numero aperas la nova "logo" de la Nîma grupo : la krokodilo sub la palmarbo. Mi pardonpetas se ĝi ne ankoraŭ aperas en la titolo: estos por venontfojoj



En Nîmes naskiĝis novan grupon " KLUBO UNESKO por la INSTRUO de ESPERANTO ". Vigla kaj junaĝa ĝi aperis; kaj ni salutas ĝin kaj deziras prosperon al ĝi !

Dankojn al Sino Gausson :
Sur la sekvonta paĝo ni proponas la Deklaracion de :
" RAJTOJ DE VENONTAJ IDAROJ "
preparita de Majoro COUSTEAU , kiun li proponas aprobi kaj sendi al viaj deputatoj : vi trovos la francan tekston en "ALMANACH COUSTEAU". Sed ne forgesu la Europajn Deputatojn !

Pri la komuna pliknito en Comps de Dimanco 12an de Majo 1991: la tre agrabla renkonto okazis unue en COMPS, poste okazis vizito de la kluzo sur la ŝpirebla kanalo apud la barejo (la vetero estis treagrabla, kaj ni bonŝance povis vidi puŝantŝipon kiu puŝis duoblan platŝipon, samtempe kanalsipon trafuis la kluzon); poste ni vizitis ŝtonminejon kaj fine pliknikis sur herbejo apud la ruinojn de Kastelo Sankt-Roman . Multaj partoprenantoj poste vizitis la abatejon de la kastelo kaj enĝoĝis ĝin. Malfeliĉe ŝajnas ke erara informo ne permesis al iu Arlesano aŭ al plurombraj Nîmanoj partopreni. Malfeliĉe !


Groupe d'Action pour la Propagation de l'ESPERANTO.

[X] 3, Rue de Combret
30900 Nîmes

☎ 66-64-03-22
Paul TOURON

DEKLARACIO PRI RAJTOJ DE VENONTAJ IDAROJ .

- 1.a paragrafo.- La venontaj idaroj rajtas ricevi sendomaĝan, neinfektitan Teron. Ili rajtas ĝui tiun-ci, konsiderante ĝin kiel apogilo de la historio de Homo, de kulturo kaj de sociaj ligiloj. Tiuj ligiloj igas ĉiujn generaciojn, ĉiujn individuojn kiel anoj de Homaro.
- 2.a paragrafo.- Ĉiu generacio dependas de havaroj kaj heredaj posedaĵoj. Ĝi devigas, kiel kuratoro nome de venontaj idaroj , malebligi ian neripareblan kaj neirverseblan trafon kontraŭ la surtera vivo . Ĝi devigas lukti por la respektindeco , la libereco de Homo.
- 3.a paragrafo.- Sekve dependas de superega devo de ĉiu generacio , por konservi la rajtojn de venontaj idaroj, kontrolŝirmi senŝindajn evoluojn kaj aliĝojn de teknologio, kiuj riskus malservi surteran vivon , laŭnaturan ekvilibron , aŭ harmonian evolviĝadon de Homara Genro.
- 4.a paragrafo.- Ĉiuj utilaj rimedoj , inklude instruado, esplorado kaj leĝaro, devigis esti utiligi por garantii tiujn rajtojn kaj certigi ke ili ne estos oferitaj pro facileco, profite aŭ oportunaĵe je la momento .
- 5.a paragrafo.- La estraroj , la neregistaj organizoj kaj la individuoj estas insiste alvokitaj por ekdenun diligente apliki tiujn principojn, kvazaŭ ili fruntas jam tiujn estontajn generaciojn, antaŭ kiuj ili komplete respondecas.



Tiu estas la teksto proponita de Majoro COUSTEAU. Li petas vin aprobi la deklaron kaj sendi ĝin al via Deputato. La francan tekston estas en "Almanako Cousteau " kaj tiun-ci vi povos sendi al viaj eksterlandaj samideanoj.

LA CANOURGUE

Post Montpellier kaj St Mamert vizitis nin en Junio Pola fervojisto el la regiono de Łódz. Nia grupeto kunvenis je tiu okazo kaj la spertoj de tiu juna kaj fervora esperantisto en Esperantio kaj Okcidenta Eùropo interesis nin. Por vojaĝi, li uzas la servojn de "Pasporta Servo". De tie-ĉi, telefoninte al pluraj adresoj de gastigantoj en Germanio, ne estis malfacile aranĝi aliajn etapojn de lia vojaĝo.

Sammaniere 4 Hungaraj gestudentoj anoncis sian viziton en Aùgusto. Kiu bonvolus helpi, ĉu trovante lokon por senpage tranokti, ĉu gastigante unu tagon? Kial ne fariĝi membro de "Pasporta Servo" kaj tiel faciligi al junaj geesperantistoj, speciale el Orienta Eùropo nune, vojaĝon al nia lando kaj nia regiono? Vi-mem decidus pri la kondiĉoj de akcepto (eĉ simpla planko por tranokti povas helpi). Ne plendu, ke mankas junaj esperantistoj. Kontribuu! Ni ĝojas, ke ĉe niaj najbaroj de departemento Aveyron kreiĝis nova grupo en Rodez. Bonan sukceson al ĝi!

RODEZ Jam ekzistis kelkaj esperantistoj en tiu departemento, en Millau kaj St Geniez. Nun ekzistas klubo en Rodez. Kelkaj malnovaj esperantistoj vekigis (post la apero de la ĉi-suba artikolo), kelkaj novaj komencas lerni la lingvon. La grupo havas nun dekon da membroj kaj en Septembro oni instruos la internacian lingvon en la kadro de la MJC de Rodez. Kunlaboros B. Legeay kaj nia komitatano A. Rocher; gratulojn! Vi certe rimarkos, ke sur la bildo B. Legeay tenas en siaj manoj ekzempleron... de SFS. Eble surprizos vin la aserto, ke du milionoj da personoj parolas esperanton en Francio... Male al la televid-programo, oni rajtas revii! Se la varbmetodo (anonco) estas interesa kaj imitinda, ni tamen evitu provizi ĵurnalistojn per malfavoraj argumentoj koncerne esperanton.

SANS FRONTIERE

L'espéranto, qu'es aco ?

« Cherche personne intéressée par l'étude de l'espéranto ». La petite annonce de Bernard Legeay a éveillé notre curiosité. Ce Ruthénois veut créer un club pour apprendre et faire connaître cette langue sans peuple, vieille de plus d'un siècle.

En voyage en Tchecoslovaquie puis en Hongrie, Bernard Legeay s'est heurté aux problèmes de langage. Il qualifie son anglais de *pas terrible* et, de toute façon, les personnes qu'il a rencontrées ne le parlaient pas mieux. L'expression de chacun s'est limitée aux gestes. Frustrante communication. Mais ses nouveaux amis, tchèques ou hongrois, pratiquaient une langue curieuse, à l'intonation chantante : l'espéranto. Là est née l'idée pour ce Ruthénois de se lancer, dès son retour de vacances, dans l'étude de cette langue nationale, synthèse des principaux types de langues créées il y a plus d'un siècle par le docteur Zamenhof, à Varsovie. En six mois, Bernard Legeay a assimilé le B.A.-Ba de l'espéranto et est tout à fait capable de lire et de comprendre un texte. Il correspond même avec un Tchéque et avec un Togolais. Il veut créer, aujourd'hui, un club espérantiste ruthénois ou mieux, aveyronnais.

Cinq cents heures pour apprendre
Conçue comme un véritable jeu de construction linguistique, cette langue qui n'appartient à aucun peuple s'articule autour d'une ossature grammaticale sans exception, un alphabet phonétique de vingt-huit lettres riche en voyelles et une formation logique des mots par le biais de préfixes et de suffixes. Enfin, la souplesse de la construction des phrases n'a pas son équivalent dans aucune langue existante. Mais cette simplicité, aussi probante soit-elle, ne suffit pas à elle seule à motiver les éventuels candidats à l'espérantisme. Bernard Legeay le reconnaît : *Je tourne en rond, en Aveyron, je connais bien une personne, à Espalion, qui le parle couramment, qui le pratique depuis dix ans, mais c'est à peu près tout.* Dilemme. L'homme se trouve isolé dans sa volonté de développer une langue censée faire un pont entre les peuples. Pour se débarrasser de l'idée que l'espéranto

est considéré comme un *truc poussièreux*, Bernard Legeay l'apprend tel un jeu de puzzle à ses enfants de 7 et 10 ans. En toute modestie mais optimiste, il a épinglé une petite annonce dans l'entrée de la bibliothèque municipale de Rodez en vue de fonder un club d'étude.
La communication, facteur de paix
Par nature et par vocation, l'espéranto est destiné à faciliter la communication entre personnes de langues différentes. Mais si l'on parcourt son histoire, cette langue universelle n'a pas connu que des périodes florissantes. Victime d'indifférences, de préjugés, ou censuré comme aujourd'hui en Irak, le phénomène linguistique est loin d'être, comme le voudraient ses partisans, la langue de communication planétaire.
En France, l'espéranto serait pratiqué par plus de 2 millions de personnes. L'enseignement ne lui réserve pas une place de choix. Seules quatre universités dans l'Hexagone (Paris-Saint-Denis, Lyon, Aix-en-Provence et Clermont-Ferrand) réservent à l'espéranto une petite place dans leur emploi du temps. L'édition boude aussi la langue internationale. Les revues ou dictionnaires que l'on peut trouver au sein d'associations sont l'œuvre de passionnés désireux de partager et de faire connaître cette langue.
Plus qu'un langage, l'espérantisme est devenu, au fil d'un



Bernard LEGEAY voudrait créer un club pour l'étude de l'espéranto. Il espère rencontrer des personnes connaissant déjà la langue ou désireuses de l'apprendre. (Photo « La Dépêche ».)

siècle d'histoire, un phénomène politique. Ignoré par les uns, censuré par les autres, l'espéranto ne survit que grâce à la volonté de plusieurs générations de pionniers.
Sans rejoindre forcément le camp des protagonistes actuels de l'espéranto, Bernard Legeay

Evelyne CABRIT.

Un club à Rodez

En espéranto :


Se vi estas interesata pri la kreado de klubo de lernado de la lingvo esperanto, vi povas kontakti Bernard Legeay

Traduction :

Si vous êtes intéressé par la création d'un club d'étude d'espéranto, vous pouvez contacter Bernard Legeay, tél. 65.67.01.72.

LARZAKO: Laù "Provence-E" staĝo por la verduloj okazos tie de la 7a ĝis la 21a de Julio. Eblas ĉeesti nur parton de la staĝo. Alĝo: 40F, ĉiu tago 130F (vegetara nutrado). Por pliaj informoj kontakti E.Mas Tel. 57 46 47 28 aù J-L.Mermet, tel. 85 26 25 85

Parto de "Lozero", la kalkebenajo "Mejean"



Ekiro al la paŝtejo

Jam en "Migranto" n-ro 122 pri la franca departemento "Lozero" mi nomis la "Causses", kalkajn eoenajojn.

Unu el ĝi la Causses Mejean situas inter la rivero Tarn kaj ĝiaj flankriveretoj Tarnon kaj Jonte. Ĝia meza alteco je 950 m. kaŭzas, malvarmajn vintrojn kaj sekajn varmajn somerojn.

Grisflavaj malaltaj montoj ĉirkaŭas ebenajetojn, kiuj iras de unu al la alia de la tri riveroj. Ili estas kaŝitaj en profundaj kanjonoj.

Sur la ebenaĵo vi ne renkontas eĉ la plej malgrandan riveron; akvo ne videblas krom, se la sezono ne estas tro seka, en natura baseneto, nomata "lavogne". Tie trinkas la ŝafinoj, apud la raraj vilaĝetoj. Antaŭ 25 jaroj la kamparanoj devis kontentiĝi kun la pluvakvo, kiu defluis de la tegmentoj en cisternojn. Ili eltiris la akvositelojn per ŝnuro aŭ fera ĉeno. Nun venas pura akvo en la domojn el la monto Aigoual, kie ankaŭ fontas la riveroj Tarnon kaj Jonte..

Krom kelkfoje neĝa mantelo, la pejzaĝo havas ofte lunan aspekton, precipe kiam ne plu verdaj estas la raraj hordeo- aŭ tritikokampoj kaj post la fojna rikolto de la herbejoj. Vi ne distingas la rarajn vilaĝetojn, ofte loĝataj de nur 2 aŭ 3 familioj, de la apuda grundo.

La kamparanoj ofte loĝas en domoj kun volboj, konstruitaj el kalkaj helgrizaj ŝtonoj de la regiono. Oni eniras per kelkaj ŝtupoj kaj balkonoj, ĉar malsupre loĝas la ŝafinoj. Kelkaj bienuloj melkas ankoraŭ mane la brutaron de februaro ĝis aŭgusto por fari la faman fromaĝon "Roquefort".

Sur iu tute plata ebenaĵo povas surteriĝi malgrandaj aviadiloj. Sed apud la Tarnona valo la kalkaj rokoj dentigitaj ŝajnis restaĵojn de detruita urbo kaj tie dancis la feinoj de niaj geavoj.

La fama groto Aven-Armand situas sude, ne malproksime de la Jontevalo. Kiam la vagonaro haltas ĉe la supro de la kaverno, haltigas ankaŭ via spiro pro la beleco de la stalagmitoj kaj stalaktitoj. Ili ŝajne brulas pro la elektra lumo. Poste vi promenas ĝis la fundo inter tiuj milformaj blankaĵoj.

Se vi iras ĝis la fundo de la altebenaĵo, la profundaj kanjonoj de la riveroj ravas viajn okulojn. Vi povas admiri la verdan akvon de la Tarno, kiu serpentumas inter la krutaj deklivoj. Ili estas kovritaj, ĉu de mallarĝaj vitejoj, ĉu de vertikalaj kalkaj muroj. Nokte dum la somero okazas sonlumspektakloj en la vilaĝoj Sainte-Enimie kaj Saint-Chély-du-Tarn. Super la Jonte valo vi povas ankaŭ ĝui la altajn klifojn kun nigraj, flavaj aŭ ruĝaj linioj.

Kiam mi estis juna, grimpante iutage inter du klifoj, mi ege timis pro aglo, kiu elflugis de sia nesto, du metrojn super mia kapo. Bedaŭrinde tiuj reĝaj adloj malaperis, sed oni anstataŭigis ilin per vulturoj.

Sur la maldekstra kaj kontraŭa flanko de la valo situas la grotoj de Dargilan, kiuj tre malsimilas al la groto de Aven Armand, enhavante multajn ĉambrojn.

Ĉar la arbaroj estas raraj, oni kelkloke plantis pinojn. La kamparanoj rikoltas aŭtune la grizajn fungojn, nomatajn "grisets" kaj la arban likenon, kio estas uzata en Grasse por fabriki parfumon aŭ medikamenton. Sed la ĉefa produkto, kiu nutras la kamparanojn estas la ŝafinoj.

Oni povas tendumi, eĉ loĝi kaj manĝi ĉe diversaj farmodomoj. Petu informojn de la gastiganta centro de Mas-de-Val: S-ino Maurin (ne estas mi) Mas-de-Val, F-48210 Saint-Enimie; tel. 66-48-52-13. Franclingve.

Bedaŭrinde, laŭ miaj informoj, ne estas Naturamikaj domoj en Lozero.

M. Maurin, Francio

Jam aperis antaŭ unu jaro turismraporto pri Lozero kaj la fama Tarnkanjono. Jen la dua parto pri tiu departemento (tre vizitinda ...laŭ la redaktoro de SFS). Ambaŭ raporto estas aperintaj antaŭ nelonge en la leginda "Migranto" sub la lerta plumo de M. Maurin. SFS atendas raportojn pri la aliaj partoj de nia regiono aŭ pri aliaj mondpartoj, se vi vizitis ilin.

Ĉe niaj najbaroj

Hispana Kongreso
15a-19a de Julio
La Laguna-Kanario

Itala Kongreso
23a-26a Aŭgusto
Torino

-11-

A R I E G E : Fine de Majo kontentige disvolviĝis en la vilaĝo Montferrier staĝo, kun D. Terziev el Sofia kaj L. Barbana el Italio; aranĝis la tuton Jorgos. Pro ĝenerala intereso pri ĥorumado, Jorgos certe aranĝos samstilan staĝon en 92. Du kunvenoj okazis dum la semajnfino, la unua por aktivuloj de ĉirkaŭpirenaj regionoj, la dua por starigi federacion en la regiono suda-pirenea. Venis homoj el Sud-katalunio, Toulouse, Agen, Bordeaux, Aveyron, Lozère, ktp. Kunlaborado certe efikos.


T O U L O U S E :

KARLINE

KARLIN'

Est mon prénom.

Je suis bien arrivée le 8 mai 1991
et depuis, papa et maman ne s'ennuient pas...
mais cela leur fait plaisir.
(français)



Es el meu nom.
He arrivat feliĝment el 8 de maig de 1991
i desd'aleshores, el papa i la mama
no s'avorreixen ... però aixó els hi agrada.
(catala)

Estas mia nomo.

Mi bone alvenis la 8an de majo 1991
kaj de tiam, paĉjo kaj panjo ne enuas ...
sed tio plezurigas ilin.
(esperanto)

Es mi nombre.
He llegado felizmente el 8 de mayo de 1991
y desde entonces, papá y mamá no se
aburren ... pero esto les gusta.
(castellano)

Sylvie BAUDIN - Floréal MARTORELL
F - 31450 DONNEVILLE - FRANCE

Ni tutkore gratulas la gepatrojn kaj deziras bonfartadon al la karulin'.

SUD-KATALUNIO :

25a kataluna kongreso de esperanto en TARAGONO
inter la 1a kaj la 3a de Novembro
en la loka universitato

Aprobiĝis la kongres-temo **Esperanto kaj turismo**. Por fakte pritrakti ĝin, oni invitis specialistojn, sed konkretaj nomoj ankoraŭ ne firmiĝis. Okazos debato dum la lasta kongres-tago. Ni invitas individuojn kaj kolektivojn prezenti spertojn kaj proponojn.

Preskaŭ certe ni sukcesos veni al la kongreso eistaran sovetian aktivulon. Li prelegos al ni pri si-landa plej aktuala temo: **Perestrojko**. Cetere, li restos ĉe ni kelkajn tagojn post la arango, kaj nia Asocio proponas, ke li ripetu la prelegon en diversaj urboj, se invitoj venas.

Ankoraŭ ne konfirmiĝis la arta programo, tamen oni antaŭvidas modernan muzik-ensemblon kaj alian distran programeron.

Kredeble, la Kongreso estos sufiĉe internacia pro la homoj, kiuj jam sciigis sian deziron partopreni: bulgaroj, litovoj, sovetianoj, portugaloj, hispanoj k.a.

Nepre antaŭvidu vian partoprenon!

"Kataluna Esperantisto" ankaŭ mencias la aperon de "Frequències" kaj de "Eŭska Kverko". Eldonas la unuan revuon "Kataluna E^o-junularo" kaj la duan "Eŭska E^o-Asocio". Ambaŭ estas aboneblaj.

En Julio okazos tri samtempaj E-kursoj en Barcelono


Ste FOY la Grande: Tie kunvenos en la kastelo de La Lambertie de la 21a ĝis la 28a de Julio Mondcivitanoj, debatos pri la temo "La Eŭropo de la Civitanoj".

Pluraj prelegoj okazos en E^o, ekz.: -Kiun interkomunikilon por la eŭropaj civitanoj? (G. Silfer) -Eŭropo tra historio (J. Roberts) -La komunuma sperto de Don-Kozakoj (B. Zozulja)

Por la tuta semajno (prelegoj) + tekstoj de la staĝo : 250F (unutaga partopreno: 50F)

Por pliaj informoj kontakti Michel Marko Grésillou Rte de Sa-vignac 47150 Monflanquin
Tel. 53 36 44 50

TUTMONDA FESTO



En Loreno, koro de la Verda Eŭropo naskiĝis la aerveturado. Pilâtre de Rozier estas la unua homo, kiu flugis en la aero. Tiel Loreno (orienta Francio) fariĝas la tutmonda centro de aerveturado. Por festi la inaŭguron de la nova flughaveno Metz-Nancy-Lorraine, okazos de la 26a de julio ĝis la 4a de aŭgusto tutmonda festo. La organizantoj atendas 3.000 aerostatojn el 30 landoj kaj 500.000 vizitantojn. **ESPERANTO-FRANCE** havos budon, partoprenos la filatelian ekspozicion, aŭdigos kanzonojn.

Je tiu okazo vendocela, ni bezonas amason da insignoj, kompreneble kun la verda stelo, sub iu ajn formo. Eltirkestigu viajn malnovajn insignojn, kaj sendu ilin al nia sidejo, ni aĉetas ilin je 3Fr po unu. Evidentas, ke ni flanken metos la koncernan sumon, faros al vi bonhavan fakturon kiun vi dekalkulos el via jarfina kotizo (aŭ pagos per poŝtmarkoj se aspektas pli taŭge al nia kaso-servo). Tuj sendu al nia sidejo Cerisaie viajn troajn insignojn, metu en la pakajon paperon formatan de duona paĝo kun nomo, plenkorekta adreso, nombro da insignoj. Propono validas 3 semajnojn.

LA KVINPETALO (internacia stagejo de LF-Koop) en Bouresse 86410 (Tel.49 42 80 74)
En la n° 115a ni jam menciis la diversajn staĝojn en Grésillon, en Habère-Poche (24-31 VIII)
kaj Sète (7-14 IX). Ĉi-foje jen la staĝoj ĉe "La Kvinpetalo"
Julio 11-16: Preparo al la skriba parto de Pedagogia Atesto kaj Altaj Studoj
Julio 18-23: Preparo al lingva instruado; historio de la lingvo; preparo al la parola parto
de Pedagogia Ekzameno
Julio 25-30: Informado kaj publikaj rilatoj; trejniĝo pri intervjuoj, leteroj al redakcioj...
Aŭgusto 01-06: Kudrado kun praktika akiro de fakaj terminoj
Aŭgusto 08-13: Tradukarto -tekstoj de modernaj aŭtoroj francaj
Aŭgusto 15-20: Pri literaturo; la literatura listo de W. Auld
Aŭgusto 22-27: Teatro kaj tiel plu
Oktobro 24-28: Praktikado de la lingvo
Oktobro 29-Novembro 02: La Kvinpetala Novembro
*Fine de Junio okazis migrado ekde "la Kvinpetalo" tra Romanika Poitou. Tiu migrado estis por
esperantistoj (praktikado) kaj ne-esperantistoj (iniciigo). Ĝi okazas ĉiujare, ĉiufoje en
alia loko. Esperable ni povos ĝin anonci ĝustatempe en 92.*

ALVOKO el BUDAPEŝTO: Sro Lentaigne petas nin helpi tiun esperantiston. Sro ZĀGONI
***** estis multjara delegito de UEA en SFINTU GHEOGHE (Rumanio). Lia
nomo ankoraŭ troviĝas sur la Jarlibro de 1990, kvankam li devis fuĝi pro la eventoj. Li
estis ĉef-bibliotekisto. Nun li devas vendi la memoraĵojn, kiujn li sukcesis savi el Rumanio,
penetraĵojn, librojn, popolartaĵojn... por aĉeti malmultekostan loĝejon, dum estas ebleco.
La kondiĉo de ŝtata monoprunto estas la pago de 900000 forintoj. En kortuŝa letero, li
priskribas la malfacilaĵojn de sia familio. Li kalkulas sur la helpo de la esperantista
familio por iom elturniĝi; jam kelkaj kontribuis al la solvo de ĉiuj multaj problemoj.
Se vi bonvolas helpi, kontaktu L. Lentaigne aŭ tiun samideanon: ZĀGONI Jenö -Budapest
Radvány utca 30/1118 Hungario. Anticipan dankon!

RADIO POLONIA daŭre elsendas en E°, eĉ se pro la ekonomiaj cirkonstancoj oni devis
redukti ĝis tri elsendoj ĉiutage en E°. Eblas sendi salutojn al amiko sur la ondoj de RP
skribante leteron aŭ karton laŭ la jena modelo:

Adreso de la mendanto / Dato

Mendilo por "Koncerto kun bondeziroj": Bonvolu sendi en mia nomo salutojn al....

(nomo, antaŭnomo, adreso precize kaj klare skribitaj sen mallongigoj)

Kune kun la salutoj mi proponas laŭlegi la jenan (mallongan) salut-tekston:.....

Bonvolu sendi al mi ... mendilojn por "Koncerto kun bondeziroj"

... program-informilojn pri la E-elsendoj de Varsovio por disdono
inter miaj geamikoj, samklubanoj. + Subskribo

(Radio Polonia. Esperanto-Redakcio 00-950 Varsovio Box 46 Pollando).

*SKRIBI al gazetoj, radiostacioj, ktp estas
rekomendinde, kiam temas pri la lingvo-problemo.
En SFS 115 ni menciis la sugeston de Claude
Sarraute, subite konscia pri la lingvo-problemo
en Eŭropo... uzi pergestan komunikadon. C. Sarraute
ne estas konata nur pro tio, ke ŝi skribas ĉiu-
-tage en "Le Monde", sed ankaŭ pro tio, ke ŝi ape-
-ras je la televido ĉiudimanĉe kun Jacques Martin.
Jen la karto ricevita de J. Hérin, kiu skribis al
ŝi por informi, ke ekzistas kaj bone funkcias iu
internacia lingvo nomita Esperanto.*


Le Monde

CLAUDE SARRAUTE
Editorialiste

Je suis désolée, je viens seulement de
retrouver votre adorable lettre au sujet de la
cacophonie linguistique en Europe. Elle m'a
énormément intéressée.

Croyez à toute ma sympathie.

15, RUE FALGUIÈRE 75501 PARIS CEDEX 15
TEL. (1) 40 65 25 47 TELEFAX (1) 40 65 25 99 TELEX 206 806 F



TAGO de la ARBO

Por la unua fojo lastjare oni festis tiun tagon en Francio.
En 1991 la dato estos dimanĉo, la 24a de Novembro. Ekde tiu tago
estos kampanjo dum tuta vintro por planti kaj plantigi arbojn.
Oni ankaŭ petos respondeculojn ĉiuspecajn interveni. Subtenas la
kampanjon R. Triolle (UFE), J. Selle (Sat-Amikaro), J.-L. Mermet (Verduloj
E°), ktp. Prezidas la sendependan ekologian asocion "La amikoj de la
arbaro" E. Mas 38 Rue Jean Moulin 33220 Ste Foy la Grande (57462711).
Informoj ankaŭ haveblas pere de 36.16 Ecobio/Arbre .

ESPERANTO/EDZ-PERANTO :

Li estas Bulgaro, parolas Esperanton, la francan lingvon, studis la hispanan. Li ankaŭ estas sola kaj serĉas amikinojn. Li estas 50jaraĝa, 1m76 alta, pezas 66 kilogramojn kaj havas brunajn okulojn... Li neniam fumis, neniam drinkis, neniam malsaniĝis (ĉu la perfekta edzo?) Gis la mezo de Julio, li estas en Svislando. Kiu skribos al li? Jen lia adreso: Filipino Petrov Iliev/Sonnenheim CH 9424 Rheineck (tel.071 44 12 20)

KORESPONDI deziras multaj homoj el Eŭropo orienta kaj Afriko; jen kelkaj adresoj:


- Esperanta rondeto "Verda Stelo" ul. Voronejska-38 SPTU-19 SHOSTKA, Sumska obl; 245110 Ukrainio
- Esperanto-klubo SVEMA P.Box 50 SHOSTKA 7 Sumska obl. 245110 Ukrainio
- Juri Korsun P.Box 7 SHOSTKA 7 Sumska obl. 245110 Ukrainio

ARMENIO petas helpon.

Skribis la Prezidanto de la Armenia E°-Asocio en Erevan. Li priskribas la kvazaŭ-militajn nunajn kondiĉojn de la popolo kaj petas moralan subtenon de la esperantistaro. Kiu bonvolas individue interveni, tiu sendu kopion de protestleteroj al Uwe Moritz prezidanto de la internacia komitato por etnaj liberecoj, Im Römerfeld 44, D5180 Eschweiler.

LIBRO :

JEAN GIONO
LA VIRO
KIU PLANTIS
ARBOJN



Legenda libro, kiu montras, kiel ami kaj respekti la naturon, legebla ekde la 8jara aĝo. La verkisto Jean Giono rakontas la trankvilan aventuron de soleca ŝafisto, kiu pasigas en Provenco la lastan periodon de sia longa vivo semante kaj plantante arbojn sur montetoj, kie kreis dezerton senbrida ekspluatado fare de la homoj. Brila demonstrado, ke ĉio eblas, se ni priserĉas taŭgajn rimedojn, se ni kapablas reharmonigi la homan estulon kun la naturo

Mendi ĉe E. Mas (vidu la antaŭan paĝon)
1 ekzemplero: 36F (kun sendkostoj 43); 10 ekzempleroj: nur 300F

TRADUKILO :

Ĝi ne estas pli granda ol kredit-karto. Tamen tiu elektronika tradukilo estas tre kapabla, ĝi povas traduki vortojn en 26 lingvojn, ankaŭ en esperanton. Laŭ la reklamo esperanto estas... eŭropa lingvo! Referenco de "L'événement du Jeudi": EDJ 51170.

40 Paŝetoj... estas bone konata libreto por komencantoj de nia amiko L. Lentaigne. La ĉi-suba anekdoto el la libreto estas aktuala, ĉu ne? Eble surprizos vin la fakto, ke ĝi aperis en Brazila revuo, nome "SEI" (Spiritisma E°-informilo). Esperanto ne konas limojn.

* TRA LA MONDO *

FRANCIO

"Araba aviadilo, kiu aŭdacis flugi super la izraelia, aera, "propraĵo" (sen permeso, kompreneble), estis devigita de la izraelaj leĝgardantoj alteriĝi sur la aerodromon de Lod (Lydda). Laŭ ordono la arabaj pasaĝeroj forlasis la aviadilon kaj estis vokitaj por esplorado. Jen unu el la arabaj pasaĝeroj rimarkis sur la uniformo de la izraela polices-tro malgrandan insignon kaj tuj etendis al li la manon.

La lasta rimarkis la saman insignon sur la vesto de la arestita arabo. Jen ambaŭ "malamikoj" varme ĉirkaŭbrakis unu la alian kaj ĝoje komencis interparoladi, kvazaŭ longjaraj konatuloj. Tiu epizodo faris je la ĉeestantaro neforgeseblan impreson. Tio estis grandioza manifestacio kontraŭ la instigantoj, kiuj disblovas neekzistantajn antagonismojn kaj semas malamon inter ambaŭ popoloj."

Kun la titolo "Ĉu malamikoj" ĉi tiu rakonto de s-ro Ben-Alter Jehiel estis publikigita sur la antologio "40 Paŝetoj al Plua Posedo"

26.000 MOTS dans toutes les langues du monde!...

ENGLISH	En	USA
GERMAN	Ge	Allemagne
FRENCH	Fr	France
ITALIAN	It	Italie
SPANISH	Sp	Espagne
PORTUGUESE	Pp	Portugal
GREEK	Gr	Grèce
ARABIC	Ar	Etats Arabes
POLISH	Po	Pologne
HUNGARIAN	Hu	Hongrie
CZECH	Cz	Tchécoslovaquie
RUMANIAN	Ru	Roumanie
RUSSIAN	Ru	URSS
SERBO-CROATIAN	Sc	Rép. Fed. Socialiste
TURKISH	Tu	Turquie
JAPANESE	Ja	Japon
HEBREW	Hc	Israël
SWAHILI	Si	Rép. de Tanzanie
INDONESIAN	In	Indonésie
DUTCH	Du	Pays-Bas
SWEDISH	Sw	Suède
NORWEGIAN	Nc	Norvège
DANISH	Da	Danemark
FINNISH	Fi	Finlande
ESPERANTO	Es	Langue Européenne
YIDDISH	Yi	Com. juive germanique



Autocollant plastique Ø 12 cm, étoile verte sur fond blanc, pour ceux qui parlent l'espéranto et qui tiennent un magasin, un guichet... une valise ou un volant.

ĉe Sat-Amikaro



DISTRA PAĜO

KRUCVORTOJ

I										
II										
III		■					■			
IV			■			■				
V				■				■		
VI					■					
VII				■					■	
VIII			■							
IX	■									
X									■	
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10

HORIZONTALE

VERTIKALE

- I) Ĉu li diras libertempe nur veraĵojn ?
 - II) Certe parolas, kiel la antaŭa.
 - III) Adverba senkuraĝigo / duoble : Nedifina pronomo / sone : Sorta donaco.
 - IV) Returnita returnanta prefikso / sone kaj returnite : Plezuriga sento / Grupe.
 - V) Majstra lerteco, de la fino al la komenco / Malbonstata ilo.
 - VI) Foje, post falo, la pariza utilas / Nerva malbeligo.
 - VII) Pelvero / Fbla besto.
 - VIII) Komenco de soleco / Ofte peniga infinitivo.
 - IX) Arba kadrero de biblia aresto.
 - X) Ne aktoro, sed tamen teatristo.
- 1) ekzemple : Politikistaĉo.
 - 2) Kvankam ŝajnas, tiaĵo ne utilas al la baloto por la antaŭa.
 - 3) En Japanio, iuj dramoj ĉiam ekas tiel / Kampkulturilon.
 - 4) Aboco de skiado / lude : Ununura punkto / Fundamenta punkto.
 - 5) Nestaj kialoj / Returnita nombro.
 - 6) Ĉu ambaŭ seksigi ? / Kontentigi.
 - 7) Sekshava estaĵo / Komence finiĝanta tago.
 - 8) Parto de stomako / returnite : Infana veturilo.
 - 9) Subtera best / ekzemple : Panujo.
 - 10) Kristana prapreĝejo / Kapo de mitologia bovino.

Dro BERTHONNEAU.

Solvoj de la n°115 (solvoj de 116 prokrastitaj)

Proverboj: 1: akvo kaj pano/servas al sano. 2. Altan arbon batas la fulmo
3: amiko de amiko estas ankaŭ amiko

Distranĉitaj proverboj: 1. Malbona herbo froston ne timas 2. pri gustoj oni ne devas disputi

Ŝaradoj: ĉevalo, perturbo, milano, ranunkolo

enigmo: konto, larvo, dento, anizo, venki, ŝtopi, raspi, kupeo, sulko, trufo.

RIMOJ KAJ PROVERBOJ : Kompletigu la sekvantajn proverbojn.

Ĉe botisto la / estas ĉiam kun truo (ĉiufoje trovu la francan ekvivalen-
-ton)

Ne ĉiam per aĝo/mezurigas la

Granda / en malgranda glaso

Kiu venis post la manĝo/, restas sen

Kiu rompis la glason/, ordigu la

El malplena / vane ĉerpas kulero

Celi / trafi aeron

Post brua vento/, subita

Por pot' argila, poto fera/ estas najbaro.....

Per / venas scienco

Ne ekzistas / sen benefico

Kiu konstante lokon ŝanĝas/, neniam sin

Ne tro komplike, ĉu ne?... sed nun mankas ambaŭ rimiĝantaj vortoj

Kiu du leporojn, neniun

Por unu f....., por alia ĉ.....

Pli bona estas vorto ol kuko

En ĉiu k..... estas sia

Parolo estas....., oron similas

Kiu tro multe....., nenion a.....

Ĝi inter p..... ne mankas p.....

Pli valoras i..... ol juĝa d.....

Post dorma t..... venas bona k.....

Ne moku r....., ne atinginte la t.....

Kun kiu vi k....., tia vi f.....

Bonaj k....., bonaj k.....

Kontribuoj
por la n° 118
ĝis la 15a de
Septembro
al J. Hénin
Rte de Montcayroux
48500 La Canourgue

AGRABLAJN SOMERFERIOJN!

